BIBLIOTHEQUE
BUL
LA CHAUX-DE-FONDS

# BULTENO

## DE ESPERANTISTA KLUBO ĈE OSVĚTOVÁ BESEDA EN PRAHA 2

No 51. Septembro 1958

Aperas laŭbezone
Pri la enhavo respondas
Jiří Havlík, Plamínkové
č.12, Praha 7, t.736-37

Karaj legantoj,

Dum la lastaj monatoj via informilo ne aperis. Multaj, vere tre multaj demandleteroj, speciale el Sovetunio, asertas nin pri la grava rolo, kiun tiu ĉi modesta kluba cirkulero ludis.

De marto 1953 ĝi celis kontribui la mondpacon.

Post la nova reorganizo de Ĉeĥoslovaka Esperanto-movado, nome post la konstituiĝo de Ĉeĥoslovaka Esperanto-komitato /ČsEK - D-ro Jaromír J e r m á ř - prezidanto, Adolf M a l í k - sekretario; adreso: Blanická 4, Praha 12/ informoj pri tutŝtataj E-aferoj estos publikigitaj en cirkulero de ČsEK "Informoj de Ĉeĥoslovaka Esperanto-komitato".

Nia BULTENO plenumis tiel sian taskon, kiu ofte estis pli granda ol la ekzistintaj materialaj rimedoj. De nun ĝi daŭros aperadi kiel kutima kluba cirkulero kun informoj por nia membraro.

Laŭ interkonsento de nia klubo kun la prezidanto de ČsEK D-ro Jermář, per certa tempo la ĝisnunaj legantoj de la Bulteno de EK ĉe OB2 en Praha senkoste ricevados ankaŭ la novan organon de ČsEK.

Ni esperas, ke ĉiuj niaj amikoj subtenos nian laboron ankaŭ en la estonteco.

ESPERANTISTA KLUBO ĉe OB2
P R A H A

A.Slanina v.r. J.Havlík v.r.